We call attention to the modest efforts in this issue to illustrate our magazine. This was made possible only by contributions from the pictured-ones themselves. As time goes on we hope to receive other suggestions and donations for illustrative material to brighten our pages.

July-August Number

The current issue of "AE" brings us to a point in our development where we can now begin to "catch-up" as regards dates of issuance. Plans for the July-August issue contemplate issuance after some four to five weeks. Important news of continental Esperanto congresses and other high-lights are to be featured.

FRIENDS OF ESPERANTO

Amerika Esperantisto is not aimed solely, or even chiefly, at our members and confirmed Esperantists. EANA is not an exclusive society nor does it refuse to extend membership to, or accept support from non-Esperantists.

All people who recognize the merits of Esperanto and approve of the aims of EANA are welcome, and we should let them know this. Don't let them come begging to be accepted as members of EANA, or pleading to be permitted to help support our program. They won't. Go out to meet them; go looking for them and encourage them.

Every one of us has friends to whom we have told the remarkable story of Esperanto. They know of our enthusiasm for it; they agree to the reasonableness of the whole proposition. They respect our judgment, our enthusiasm, our motives; they are our friends. And they are thereby also FRIENDS OF ESPERANTO.

We should cultivate their interest in Esperanto. We should keep them informed. They may learn our language and become ardent Esperantists, or they may put in a good word for Esperanto when the strategic opportunity presents itself; they may even add to this moral support some of their substance to assure a full program and adequate funds for EANA.

Let us make our friends real FRIENDS OF ESPERANTO: enroll them as members if you can; subscribe to *Amerika Esperantisto* for them if you must, but keep the contact and the subject alive and vital.

A. F. DONEIS, *Chairman,*
Membership and Finance Committee.

The Esperanto Association of North America

EXECUTIVE COMMITTEE

Dr. Cecil Stockard, President, Joseph Leahy, Gen. Sec'y, Armin F. Doneis, Member



President's Letter

Well, I have just read the March-April number of the American Esperantist, from cover to cover, and I found it good!

Mr. Connor and his new editorial staff have done a splendid job. Dr. W. Solzbacher and the Very Reverend John B. Kao have both contributed some very interesting material, and we shall look forward to seeing much more from them in future numbers.

I cannot comment on all the good points and good articles in this number, or I would not have room for a very important matter that I wish to bring to your notice.

During the past year many of the readers of the American Esperantist have contributed—and paid for—subscriptions to the magazine to be sent to various University and Public Libraries. It is important that these subscriptions not be allowed to lapse. So, if you gave one or more subscriptions last year, if you don't know the date of expiration, write to the editor for this information and renew the subscription in time. If you did not give any subscription last year, won't you please give one, or as many as you will, this year? This is a splendid way of bringing Esperanto to the attention of the general public, and each subscription costs only a dollar. You can either designate a particular Library or Libraries to which you wish to send the magazine, or just send the money and leave it to the editor to select a Library, either as a renewal or in a district not already supplied.

One other matter I want to mention to you. The Estra Komitato considered the question of a Kongreso and decided that the obstacles and difficulties are too great for a representative attendance. We all hope that by next year we will be able to resume these annual meetings. In the meantime, let's all keep things going to the best of our ability.

—CECIL STOCKARD

RUMANIA SIMFONIO

W. SOLZBACHER

Ĉu vi konas la anekdoton pri la azeno? Andreo Cseh, la famkonata instruisto kaj propagandisto de Esperanto, ŝatis rakonti ĝin en kunvenoj kaj en intervjuoj kun ĵurnalistoj. Jen ĝi estas: En Bulgarujo grupo da Esperantistoj bulgaraj, rumanaj, jugoslavaj kaj grekaj vojaĝis kune al Esperanto-Kongreso, vikle bablante en la lingvo Zamenhofa. Maljuna kamparano sidis en angulo de la fervoja vagono kaj ŝajnis aŭskulti atente. Fine li demandis en bulgara lingvo, ĉu la sinjoroj ne estus tiel afablaj informi lin, kiun lingvon ili parolas tiel flue kaj vikle. Volonte oni donos al li tiun informon, diris bulgara samideano. La lingvo ja estas Esperanto, internacia helplingvo facila kaj belsona, per kiu anoj de diversaj nacioj povas interkompreniĝi. "Vi ja vidas, sinjoro," diris la bulgara Esperantisto, "ke mi, kvankam ne parolante greke kaj rumane, povas diskuti libere kun miaj grekaj kaj rumanaj amikoj". "Jes, jes", respondis la kamparano, "mi delonge pensis ke tia internacia lingvo estas necesa". "Ĉu vere, ĉu vere?" demandis la Esperantistoj, "rakontu al ni vian argumenton!" La kamparano klarigis ke li estas migranta vendisto, vojaĝanta de unu vilaĝa foiro al alia, en ĉiuj balkanaj landoj, kaj ke eĉ unufoje li iris ĝis Vieno. Li faras siajn vojaĝojn kun fidela azeno,

kiu portas sur sia dorso la vendotajn artiklojn. "Mi havas grandajn malfacilaĵojn pro la multaj lingvoj", li diris, "sed mia azeno komprenas ĉiun azenon en la mondo. Kiam ĝi renkontas alian azenon, ĉu en Hungarujo ĉu en Grekujo, la du bestoj tuj flaresploras unu la alian kaj komencas perfekte interparoladi en la azena lingvo. Mi ofte pensis: Se la azenoj komprenas unu la alian kaj la homoj ne sukcesas fari same, ĉu ili ne vere estas pli grandaj azenoj ol la azenoj?"

En la hejmlando de Pastro Andreo Cseh kaj en la aliaj landoj de Sudorienta Eŭropo la neceseco de internacia helplingvo estis facile komprenata, kaj flue parolantaj Esperantistoj abundis ĉie. Tiu regiono ja estas vera lingva Babelo. Eĉ la urbonomojn oni devas lerni en du aŭ tri lingvoj, se oni ne volas perdiĝi dum vojaĝo. Kiel diveni, ekzemple, ke Gherla kaj Szamosujvar estas la sama urbo kaj ke Sibiu, Hermannstadt kaj Nagyszeben estas ne tri urboj, sed unu sola?

Legante la ĵurnalojn, oni lasttempe ofte vidis la nomojn Lwow (Lviu, Lemberg, Leopold) kaj Czernovitz (Cernauti). Mi bone konas la du urbojn. En 1930 mi eniris Rumanujon per la fervoja linio Lwow-Czernovitz. Iomete antaŭ la pola-rumana landlimo mi komencis ordigi la paperojn,

kiujn mi portis kun mi, leterojn, manuskriptojn, raportojn. “Ĉu vi vere volas preni tion kun vi en Rumanujon?”, demandis mia najbaro. “Vi ŝajnas havi bonajn rilatojn kun la rumana polico”. “Kun la polico?”, mi respondis surprizite. “Mi havas neniajn rilatojn kun ĝi. Mi estas honesta homo. Kial la polico interesigus pri mi?” La rumana sinjoro kapskuis kiel iu, kiu renkontis nekredeble naivan stultulon. Li estis prava: Ĉe la landlimo mia situacio estis malfacila. Oni devos ekzameni miajn paperojn, la oficisto diris, kaj tio daŭros almenaŭ unu semajnon. “Sed mi ne havas tempon! Mia vojaĝplano estas preta de longa tempo!” Subite mi havis ideon: “Bonvolu legi ĉi tiun dokumenton!” Mi montris invitleteron en Esperanto, kun rumana traduko kaj kun dekkvar subskriboj kaj kaŭĉukstampoj, se mia memoro ne eraras. La dokumento estis fabrikita kelkajn monatojn antaŭe, por havigi al mi senpagan rumanan pasportvizon. La klopodo estis sensukcesa. Sed nun la dokumento servis bone. “Ho, tio estas Esperanto”, diris la oficisto, “mi iam komencis lerni, sed mi forgesis... Bone, jen viaj paperoj, sinjoro; vi povas eniri Rumanujon”. “Mi dankas,” mi respondis en Esperanto, aldonante en rumana lingvo: “Multu mesc”.

Czernovitz estas kosmopolita urbo. Iun knabeton sur la strato oni povas demandi en iu el kvar

aŭ kvin lingvoj (rumane, ukraine, ruse, germane, pole); oni ricevos respondon en la sama lingvo. Sed interkompreno en aferoj, pri kiuj oni ne parolas sur la strato, estas malfacila, kaj sub la paca supraĵo brulas danĝeraj pasioj naciaj kaj politikaj. Esperantistoj abundis en Czernovitz. En ĉiuj ĵurnalvendejoj oni vidis ekzemplerojn de nova Esperanto-gazeto, de kiu la dua numero ĵus aperis en Czernovitz (mi forgesis la nomon; aperis nur malmultaj numero). La Delegito de Universala Esperanto-Asocio estis afabla kaj sperta maljunulo, Majoro Hasenoehrl. Li estis estinta majoro en la aŭstra-hungara armeo. Ricevante nur malgrandan pension, li laboris en rumana banko kaj vivis kun sia bonkora (kaj Esperantista) edzino en garaĝsimila dometo, kie mi pasigis kelkajn interesajn vesperojn kun grupo da gesamideanoj.

Mi vojaĝis trans la Karpatajn Montojn per nekredeble primitiva transportilo kiu nomiĝis “fervojo”. Ŝajnas ke ĝi estis konstruita dum la unua mondmilito kiel dumtempa arma fervojo, sed ĝi ankoraŭ servis. Unu lokomotivo malnovega kaj unu vagono, uzata por personoj, bestoj kaj komercaĵoj, moviĝis sufiĉe malrapide por ebligi dumvojaĝan kolektadon de floroj. La vagonaro dereliĝis nur du aŭ trifoje. La lokomotivisto kaj la hejtisto malrapide, sed kontentige aran-

ĝis la aferon, kaj ni ne falis en unu el la tre romantikaj, sed ne tre allogaj abismoj.

En Transilvanio kaj en Banaŭto la babela lingva konfuzo estis ne malpli granda ol en Bukovino, kies ĉefurbo estas Czernovitz. En Rumanujo mi vizitis rumanojn, hungarojn, seklerojn, germanojn, judojn, armenojn, polojn, ukrainojn, rusojn kaj serbojn. Mi faris publikajn prelegojn en kvar lingvoj kaj en privataj konversacioj parolis aŭ parolacis dekunu lingvojn. Angla ne estis inter ili. Nur unufoje, en Blaj, mi renkontis personon (li estis Deputito en la rumana Parlamento), kiu sciis la anglan lingvon.

Estis necese organizi specialajn kunvenojn por la diversaj naciaj kaj lingvaj grupoj. En Gherla, ekzemple, mi posttagmeze parolis en franca lingvo por la rumanoj, kaj la sekretario de la episkopo tradukis miajn vortojn en rumanan lingvon. Vespere mi paroladis en la armena kunvenodomo en Esperanto por la armenoj kaj hungaroj, kaj la Esperanto-Delegito, Profesoro Bela Babos, hungaro, tradukis hungaren. En Temeŝvaro (Timisoara) mi paroladis por la katolikoj germanlingve, por la protestantoj en Esperanto, kun hungara traduko farita de la prezidanto de la Esperantista Kalvinista Junulara Asocio.

Esperanto estis utila ĉie. Ofte sur la strato, en la fervojo, en oficejo, mi vidis la verdan stelon.

Sed la plimulto de la Esperantistoj ne estis membroj de Esperanto-asocioj kaj ne legis Esperanto-gazetojn, ĉar ili estis tro malriĉaj. Salajroj de profesoroj, oficistoj, instruistoj estis nekredeble malaltaj, kaj multaj ne povis permesi al si la lukson aboni gazetojn kaj aĉeti librojn.

En Cluj (Kolozsvar) F-ino Eugenia Morariu, fratino de la famkonata Cseh-instruisto Tiberiu Morariu, direktis la Rumanan Esperanto-Instituton fonditan de Andreo Cseh. Kelkaj Esperantogazetoj aperis en Rumanujo, en București, Timisoara kaj Cernauti. En Alba Julia, la katolika episkopo, Grafo Majlath, komprenis kaj iomete parolis Esperanton; li subtenis la Esperantomovadon per mono kaj kuraĝigaj vortoj kaj parolis al mi kun granda fiereco kaj simpatio pri la laboro de Pastro Andreo Cseh, kies episkopo li estis.

Hodiaŭ la milito furiozas en Rumanujo, kaj tirana registaro obeanta al Hitler persekutas progresemajn movadojn. Henriko Fischer-Galati, eks-prezidanto de la Rumana Esperanto-Societo estas rifuĝinto en Istambul, Turkujo. Profesoro Trancu-Iasi, kiu ankaŭ iam prezidis la Rumanan Esperanto-Societon kaj kiu estis iam Ministro de Komerco en rumana registaro, mortis en 1940, kiam ankaŭ Episkopo Majlath mortis. La plej famkonataj Esperantistoj el Rumanujo, Cseh, Morariu, Pragano, estas eksterlande.

La nombro de Esperantistoj en Rumanujo hodiaŭ certe ne estas malpli granda ol ĝi estis, kiam mi vizitis tiun interesan landon, kie la lingva problemo estas ĉiuhore praktike videbla. Ni esperu, ke post la venko de la Unuigitaj Nacioj la politikaj kaj ekonomiaj problemoj de Sudorienta Eŭropo estos kontentige solvataj kaj ke Esperanto, kiu en tiu parto de la mondo jam estas vivanta realaĵo, ludos gravan rolon por venki la lingvan baron.

En 1930 la ponto, kiu nun ebligas rektan fervojan vojaĝon inter Temeŝvaro (Timisoara) kaj Belgrado (Beograd), anko-

raŭ ne estis konstruita. Mi do iris fervoje al Panĉevo, kaj de tie ŝipe al la ĉefurbo de Jugoslavujo. La Danubo aspektis kiel larĝa, malpura, flava oceano, kaj ĉiuj lingvoj balkanaj aŭdiĝis sur la ŝipo. Mi estis iom timema, ĉar la polico de la diktatoro, Generalo Jivkoviĉ, havis malbonan famon. Kelkaj el miaj kroataj kaj slovenaj amikoj estis en liaj malliberejoj. Sed kiam la ŝipo alteriĝis en Belgrado, mia timo foriĝis: Sur la kajo mi ekvidis la flagon kun la verda stelo. Mi sciis, ke ankaŭ en tiu lando mi havos, malgraŭ cio, la helpon de Esperantistaj geamikoj.

VILMOS BLEIER — LITERATURISTO

Antaŭ kvar jaroj okazis la katastrofo en Nederlando, Belgujo, Luksemburgo kaj Francujo. La milito detruis multajn vivojn kaj multajn valoraĵojn, ankaŭ en la Esperanto-movado. La Esperantistaro neniam forgesos la nelacigeblan direktoron de "Literatura Mondo", Vilmos Bleier, kiu mortis tute juna en la batalo de Parizo, la 16-an de Junio 1940. Li venis al Francujo el Budapest en la komenco de la milito. Dum multaj jaroj li prizorgis la belaspektan, bonstilan kaj gravan revuon "Literatura Mondo". Li eldonis la admirindan "Enciklopedion de Esperanto" kaj ne malpli ol 79 Esperanto-librojn dum nur ok

jaroj. Multaj el tiuj volumoj restos klasikaj en nia literaturo. Lian ageman personecon trafe priskribas Kalocsay en siaj "rimportretoj":

*Bleier—la korespond-uzino,
Produkto: tricent tunoj jare.
Tereno—tuta mond' senbare,
Fervoro, lerto kaj rutino.*

*En valorpezo, prezkombino
Li trafas ĉiam senerare.
Bleier—la korespond-uzino,
Produkto: tricent tunoj jare.*

*De mondoĉefo ĝis mondoĉefino
Li manuskriptojn serĉas flare
Kaj ilin kaptas, ĵetas are
En faŭkon de kompostmaŝino.*

Bleier—la korespond-uzino.

MALLONGA HISTORIO DE ESPERANTO

VERKITA DE ERNEST DODGE

Redaktista Noto: Ĉi tie troviĝas la unua parto de historia serio pri Esperanto. Tri pliaj partoj troviĝos en la tri sekvantaj numeroj de "Amerika Esperantisto".

ANTAŬPAROLO

Ofte okazas ke novaj Esperantistoj, aŭ kelkfoje eĉ malnovaj, havas nur nekларan komprenon pri la historio de la Esperantomovado. Pli bona informo pri la noblaj klopodoj de la pioniroj, pri iliaj ŝajne nesupereblaj malfacilaĵoj kaj postaj venkoj, certe plifirmigos nin, la nunajn Esperantistojn, en dankemo pro la pasinto kaj konfido pri la estonto. Pro tio estas pretigita tiu ĉi serio da artikoletoj, skizantaj la plej elstarajn faktojn en la historio. Parte ĝi estas bazita sur la du malgrandaj sed bonegaj volumoj de Profesoro Edmond Privat, kies rakonto kondukas nin nur ĝis 1927; kaj parte sur aliaj fontoj de informo, el kiuj tre bona estas la nova angla volumo (1943), "The Language Problem, its History and Solution," de E. D. Durrant.

Oni povus dividi la 57 jarojn de Esperanto diversmaniere, laŭ plaĉo. La verkanto de la nuna artikolserio vidas ĝin nun naŭ periodojn. La deka komenciĝos post reveno de paco — kaj povas esti tempo de multe pli granda venko por la Esperantaj lingvo

kaj idealo ol pasinteco iam vidis. La unua artikolo tre koncize pritraktos la du plej fruajn periodojn.

★ ★ ★

UNUA PERIODO 1887-1894

Tiu estis tempo de komenciĝoj, kaj unua pruvado pri indeco de la tute nova lingvo. En julio, 1887, D-ro Zamenhof aperigis la unuan lernolibron en rusa lingvo. Jam antaŭ fino de 1887 li eldonis ĝin tradukitan en lingvojn polan, francan, germanan. Kaj en la sama jaro, duan broŝuron en la rusa.

D-ro Zamenhof dissendis la unuan libron, senpete-senpage, al multaj profesiuloj kaj al diverslandaj ĵurnaloj, redakcioj, societoj. La unua plano estis, ke multe da personoj aŭdintaj pri la nova lingvo subskribu promeson eklerni ĝin, nur kiam granda nombro da homoj promesos la samon. Tiu grandioza plano pruviĝis nepraktika; sed kelkcent interesatoj jam tiam lernis la lingvon kaj ekhelpis je la propagando.

En 1888 interesiĝis pri Esperanto la Amerika Filozofia So-

cieto en Philadelphia; sed espero ke ĝi povos grave kaj efike antaŭenigi la aferon pruviĝis iluzia. Multe pli grava estis la konvertiĝo al Esperanto, ankaŭ en 1838, de forta prilingva klubo en Nurnberg, antaŭe dediĉita al la malfacila kaj nepraktika lingvo, Volapuk. La antaŭe Volapukistoj, nun Esperantistoj, en Nurnberg multe akcelis la aferon. Ili ebligis la eldonadon, 1839-44, de la unua Esperanta gazeto, "La Esperantisto". Ĝi aperis en lingvoj germana kaj esperanta.

Dum tiu unua sepjara periodo kelkaj inventemaj aliĝintoj al la movado urĝis kaj urĝadis ke la lingvo, kvankam tre bona, povus esti plibonigita per iom da reformo. Sed ili ne konsentis inter si pri la tiel nomataj 'reformoj'. Tamen ili faris kaj faradis sufiĉe da bruo, ke finfine D-ro Zamenhof mem nevolonte decidis elpensi sistemon de provizoraj ŝanĝoj en la lingvo, kaj lasi la tiamajn Esperantistojn voĉdoni pri ili. Tion li faris — kiel supre dirite — nur nevolonte, sed kiel devon; ĉar li deziris ke la gvidado de la afero estu tute demokratia. Feliĉe, kaj je granda kontento de D-ro Zamenhof mem, decidiga plimulto de l'Esperantistoj kiuj partoprenis la voĉdonadon preferis Esperanton en ĝia unua, neŝanĝita formo. La jaro 1894, kiam okazis tiu grava decido, nome, resti fidela al Esperanto en la formo unue anoncata al la mondo, signas finon de la unua

epoko kaj transiron en epokon duan.

★ ★ ★

DUA PERIODO 1894-1900

Tiu estis kriza tempo por la nova kaj ĝis tiam neforta afero. Oni opinias ke 15,000 homoj jam studis la lingvon, kvankam adresoj apenaŭ de 2,000 estis konataj. Sed financaj malfacilaĵoj malhelpis evoluon de la movado. Pluraj fruaj Esperantistoj laciĝis kaj ekdubis pri sukceso, nur tial ke plena sukceso ne estis tuja. Kaj neatendita interdikto de l' rusa registaro kontraŭ la gazeto, "La Esperantisto," estis gravega frapo. La interdikto estis dekretita pro publikigo de unu tradukaĵo el la verkoj de Tolstoj, kiun la carista reĝimo malŝatis. Tial ke tri-kvaronoj de la tiamaj abonantoj estis rusoj, aŭ ruse regataj poŝtoj, la gazeto ĉesiĝis en 1895.

Spite tion, la afero antaŭeniĝis en aliajn direktojn. Nova gazeto, "Lingvo Internacia," aperis en Uppsala, Svedujo. Pluraj gravaj literaturaĵoj aperis en Esperanto, tiaj, kia estas "Hamleto," tradukita de Zamenhof. Kaj en Francujo, antaŭe ne interesita pri Esperanto, intereso sin ekmontris. En 1898 fondiĝis Esperanto-klubo en Parizo, sub gvidado de tre energiaj homoj. Tio estas grava preparo por la pli vigla periodo baldaŭ komenciĝonta.

(Daŭrigota)

BAZA ANGLA NE ESTAS VIVANTA

Mi ŝatis karikaturon en la semajna gazeto "The New Yorker" de la 20-a de Majo 1944. En tropika lando, kiu povus esti Hindujo aŭ Nord-Afriko, oni vidas usonajn soldatojn, kiuj portas sur siaj dorsoj pezajn kesojn el aŭtomobilo en armean arsenalon. Ilin direktas energia kaj sendube severa serĝento, kiu larĝe malfermas sian buŝon, elpuŝante vortojn, kiujn oni di-

venas, sed ne ordinare presas en gazeto! Du indiĝenoj, kun belaj turbanoj, mire rigardas kaj aŭskultas, kaj unu demandas la alian: "Ĉu vi kredas ke li estas parolanta en Baza Angla?"

Oni emas respondi: "Ne, Via Emira Moŝto, nur vivanta lingvo entenas blasfemajn vortojn. En Baza Angla oni povas nek beni nek malbeni".

—W. S.

La Tre Respektinda Pastro Gabriel N. Pausback, Asista Generalo de la Ordo de Karmelitoj, nun troviĝas en Aŭstralio. Letero de li antaŭnelonge estis plenplena da intereso kaj entuziasmo por Esperanto. Survoje al Melbourne li organizis Esperanto-kurson sur la ŝipo. Post anonco pri senpaga kurso proksimume 30 personoj aliĝis al la grupo. Li instruis ĉiutage, sed dum restetoj en havenoj survoje, iom de la maristaj studentoj perdiĝis kelktempe — kompreneble! Pastro Pausback tre multe laboris por Esperanto dum li estis ĉe ni en Nov-Jorko. Ni ame dankas lin pro tio, kaj esperas ke li daŭrigos ĝin kiel eble plej multe en sia nova situacio.

* * *

S-ro Elwyn C. Pollock, Direktoro de la Esperanto-Libro-Servo de Usono, 4434 Rosemont Ave., Montrose, California, fervore laboras por Esperanto. Li estas Delegito de IEL, helpas al diversaj instruistoj kaj klasoj, kaj ĝenerale estas tre aktiva

S-ano William P. Vathis diversmaniere helpas subteni nian gazeton, "Amerika Esperantisto". Li varbas por ĝi, kaj mem pagas la abonprezon por kelkaj bibliotekoj. Interalie li sendas la jenajn babilajerojn: "Duffy's First Reader", gaja peco da humoro eldonita de la radio-programo "Duffy's Tavern", donas iom *mistikan* difinon de Esperanto: "Spanish for Spanish". (Redaktista Noto: Eble pli 'mistaken' ol 'mistikan', ĉu ne?, ĉar la malkleraj pri lingvo-scio ofte konfuziĝas inter 'Espanisho' kaj 'Esperanto!') — *Sammy Martin*, juna samideano de Emporia, Kansas, estas nun 'Ensign' en la USNR ĉe Boulder, Colorado, kie li studas la japanan kaj aliajn lingvojn. Li jam lernis la rusan en ses-monata intensa kurso. — *Edgar Simon*, en Hindujo, vizitis Esperanto-kunvenon kiam li estis en Hobart, Tasmania (Aŭstralio). — Kaj ne forgesu abonĝi kaj abonigi al *Amerika Esperantisto*. Ĝi meritas vian subtenon. — W.P.V.

RIMARKU: Bonvole informu la gazeton "Amerika Esperantisto" pri korektaĵoj aŭ adres-ŝanĝoj tuj. Skribu la malnovan kaj ankaŭ la novan adresojn. Tuja atento pri tiuj detalaĵoj faciligos la laboron ĉe ni, kaj certigos al vi la ricevon de la gazeto.

INTER LA ESPERANTISTARO

Charles Solin, Sekretario de la *Esperanto-Societo de Bruklino*, skribas pri la vigla aktiveco por Esperanto inter la anoj. Ĉe la lastatempa kunveno en la Hotelo Nov-Jorkano, oni aŭdis pri diversaj klopodoj: *Herbert L. Smart*, organizanto de la kurso ĉe la Publika Biblioteko, Orienta 23-a Strato, raportis rekord-an ĉeestantaron dum Marto. La nova instruanto estas *Ralph Bonesper*. La kurso ĉe la Lernejo 'Rand', organizita kaj instruita de *Louis Dormont* finiĝis antaŭ ne longe. *Harry G. Schatz*, Prezidanto, kondukis la "Vivantano Gazeton". *Henry Nagin* informis pri artikolo en la "Nov-Jorka Poŝto" kiu temis pri Esperanto. Oni aŭdis ke *Charles Hornig* gvidas Esperanto-klason. *S-ino Fellows* ludis la pianon por Esperanto-kantado.

* * *

R. W. van Gelderen, radio-oficiro de nederlanda maristaro, vizitis la redaktejon. Li raportis interesan sperton pri Esperanto en Islando. En Stykkisholm Esperanto servis lin bone, kiam Islandano ne povis paroli angle aŭ nederlande kaj li ne povis paroli islande. Sed la Islandano demandis: "Ĉu vi parolas Esperante?" "Kompreneble!" — kaj la lingvaj baroj falis! Li ankaŭ diris ke gazeto "Matena Stelo" estas eldonata Esperante en Islando.

* * *

John L. Spence kaj *Fred Wharff* sendas koran saluton de Kalifornio, kaj skribas: "Unuope kaj grupe ĉiuj devus batali kontraŭ tiuj tielnomitaj 'internaciaj lingvoj' krom Esperanto, ĉar ili multe malfaciligas la progreson de la ideo de internacia helplingvo." Klarvidemaj estas niaj fervoraj samideanoj Spence kaj Wharff. Ni sekvu la admonon.

La Esperanta Interlingvo-Asocio kunvenis en la Hotelo Nov-Jorkano la 20-an de Majo. *Profesoro Mario A. Pei*, de la Universitato Kolumbio, estis gast-parolanto. Sekvis programo kun teatraĵeto, "La Esperanto-Klaso", en kiu partoprenis studentoj de la Cseh-Kurso gvidita de *Doris Tappan Connor*. *D-ro Wilhelm Solzbacher*, mondkonata Esperantisto, prezentis la atestejn de la Internacia Cseh-Instituto al la studentoj.

* * *

S-ino Doris Tappan Connor faris Cseh-demonstracion de Esperanto antaŭ grupo de lingvaj studentoj ĉe Universitato Kolumbio en Majo. Tiu estis la dua kiun ŝi faris tie. La Cseh-demonstracio estas regula prezentaĵo en la lingvaj klasoj de *Profesoro Pei*.

* * *

F-ino Helene Wolff raportis pri Esperanto-kurso kiun ŝi gvidis en San Francisco, Kalifornio. Unu el la partoprenintoj estis *S-ro Hunting*, Direktoro de la Junularo de la Ruĝa Kruco. Multmaniere ŝi propagandas por nia afero. Ni esperas ke ŝi daŭre sukcesos.

* * *

S-ro Thomas A. Goldman, fervora Esperantisto dum la lastaj dekunu jaroj, kaj iama Prezidanto de la Esperanto-Klubo de Washington, D. C., nun estas soldato, studanta elektronikon kaj radiotelefonion ĉe *Truax Field* en Wisconsin.

* * *

ATENTU! — La plej multaj de la donacabonoj al "Amerika Esperantisto", por bibliotekoj, finiĝas je ĉi tiu numero. Nun, estas la tempo por reabonoj por la 'specialaj' libroj! Multaj samideanoj jam frue sendis abonojn, sed multaj ankoraŭ devas atenti pri bibliotekoj.

DODODODAT!

Ĉu nova 'Ido'-lingvoprojekto?

Conrad Fisher sendas interesan rakonton pri sia sperto kiel patro de Denaska Esperantistino. Sed li mem rakontu:

Mia filineto havis du jarojn en la pasinta Aprilo. Ŝia patrino parolas nur angle kun ŝi, sed mi penas nur esperante paroli kun ŝi. Se senintence mi pekas kaj angle diras ion, precipe en kolera humoro, mi tuj tradukas kaj daŭrigas esperante. Jen kelkaj rimarkoj pri ŝia parolado je la dua jaro.

Marcella (ŝia nomo) inklinas ripeti kaj uzi nur la lastajn du silabojn. Tial mi kutime uzas la simplan radikon kiel eble plej ofte, kvankam mi ne uzas malbonan gramatikon por eviti malfacilon. Ekzemple, anstataŭ *bovino* mi uzas *bovo*, ĉar ambaŭ seksoj samaspektas, ĉu ne? Simile mi uzas: *bebo*, *panjo*, *paĉjo*, *viro*, *ino*, anstataŭ la pli longaj vortoj *infaneto*, *patrino*, *patro*, *virino*. Sed mi ne uzas tian artifikon se la vorto bezonas plenan longon: *traŭncilo*, *bonodoras*, *alta seĝo*, *kuirejo*, *skribmaŝino*.

Ĝis la antaŭaj kvar kvin tagoj ŝia sola vorto por trinko estis *aku*; sed nun ŝi kelkfoje diras angle *dink*. Tamen mi ĉiam diras: “Ĉu vi volas akvon?”, kaj ŝi ĉiam respondas: “vo'at aku”, aŭ “aku”.

Jen oftaj formoj de vortoj: *pan'o*, *aku*, *'akto*, *ba-ŭo* (*ĉevalo*), *bobo* (bovo), *pato* (paĉjo), *tab'o*, *'kŭibi* (skribi), *'pedo* (papero), *'ono* (kraĵono), kaj fina *-s* elvenas *-t*, *r* elvenas *d*. *Bonodoras* elvenas *dodododat!* Duoblaj literoj perdas la unuan: *kt* iĝas *t*, *ŝt* iĝas *t*, ktp.

Ŝi intermiksas vortojn el angla kun tiuj el Esperanto: *hundo eatin'*, *I dancas*, *Pato 'n' Mummy*, *dere luno*, k. s. Kompreneble ŝi ankoraŭ ne scias ke ili estas el nesamaj lingvoj, sed ŝi antaŭopiniis ke ili estas aliaj vortoj por la sama aĵo.

Sendube aliaj *patroj* de denaskaj esperantistoj, el iu ajn lando, volus korespondi kun mi pri la afero. Tuj mi respondos. Jen mia adreso: *Conrad Fisher, RFD No. 1, Meadville, Pa.*

Freŝdataj Signifoj de Esperantaj Vortoj

Interesa estas la evoluo pri la interlingvo: Longaj vortoj ofte iĝas malpli longaj, kiel *aŭtomobilo* — *aŭto*, *malgranda* — *eta*, k. t. p. Pri la usonaj vortoj, “International Auxiliary Language Argumentation”, la malnova tra-

duko estis *disputado pri projektoj por internacia helplingvo*. Sed nun kiam Esperanto estas la sola vivanta interlingvo, la aktuala multe malpli longa signifo de tiuj usonaj vortoj ŝajne iĝas simple *skismilo!*

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO**, by Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT**, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .35c
- PRACTICAL ESPERANTO**, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO**, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages \$4.00
- AMERICAN POCKET DICTIONARY**, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- ESTU PRETA**, by George J. Falgier. A splendid key, with grammar, and considerable fundamental teaching .10c
- FUN WITH ESPERANTO**, by Prof. C. C. Bristor. Unique and interesting .75c
- THE ESPERANTO SONG "LA ESPERO"**. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings. .15c or 2 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY**. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages \$1.00
- STEP BY STEP IN ESPERANTO**, by M. C. Butler. One of the world's best. Paper covers .75c Cloth covers \$1.00
- DICTIONARIES**. Just received, Millidge \$3.50, and Fulcher & Long \$2.50
- STARS**. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS**, white bead background with green star in center, very popular, each .45c
- HOME STUDENT RECORDS** — made in Europe. No more to be had.

NOTICE TO MEMBERS & SUBSCRIBERS

Memberships and subscriptions, on record up to February 1, 1944, are extended two months, because of recent temporary suspension of "American Esperantist" publication.

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist", \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships.

I Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount).....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Esperanto is the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages—not to take the place of their mother tongues.

Because many have a very erroneous idea about the essence of Esperantism, representatives of the Esperanto Movement from various countries of the world, meeting at the International Esperanto Congress at Boulogne sur Mer, deemed it necessary, upon the suggestion of the author of the interlanguage Esperanto, to give the following clarification:

Esperantism is an endeavor to spread throughout the world the use of the neutral interlanguage, which "without intruding in the internal life of the peoples, and in no way aiming to displace the existing national languages", would provide men of different nations with the possibility of intercomprehension between them. A language which could serve for promoting peaceful interchange between public institutions in all lands where diverse nationalities are in conflict over the language question, and in which could be published those works which have equal interest for all peoples.

Every other idea or hope which this or that Esperantist associates with Esperantism, will be his purely private affair, for which Esperantism is not in any way responsible.